

# Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2020

Ĵaŭdon la 16an de januaro

68a jaro

---

## Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

### **Lundon la 20an de januaro** (semajno 4) *mandag*

Novaĵoj el la komitata retroŝta listo de UEA. Raportas Kjell Peder Hoff, komitatano A de NEL.

*Nyheter fra e-postlisten til UEAs styr-  
ende råd, ved Kjell Peder Hoff, som er  
det norske Forbundets representant  
der. (UEA = Verdensforbundet.)*

### **Mardon la 4an de februaro** (semajno 6) *tirsdag*

"Vidi per manoj" Otto Prytz

*"Å se med hendene". Otto Prytz.*

### **Lundon la 17an de februaro** (semajno 8) *mandag*

Ni havos gastojn el Slovenio: Peter Grbec kaj familion. Li estas instruisto pri geografio kaj Esperanto, kaj reprezentas Slovenion en ILEI. Li povos paroli pri slovena kulturo, lingvo kaj slovena E-movado.

*Vi får gjester fra Slovenia: Peter Grbec med familie. Han er lærer i geografi og esperanto, og representerer Slovenia i den internasjonale lærerorganisasjonen ILEI. Han forteller gjerne om slovensk kultur og språk og om den slovenske esperantobevegelsen.*

### **Mardon la 3an de marto** (semajno 10) *tirsdag*

JARKUNVENO vidu lastan paĝon. *ÅRSMØTE. Se siste side.*

### **Lundon la 16an de marto** (semajno 12) *mandag*

Ni trarigardos la Esperanto-organojn de niaj najbaraj landoj [*La Espero, E-o en Danio, Esperantolehti ...*]. Ĉu ni trovos ideojn tie por nia propra agado? ?

*Vi ser gjennom medlemsbladene fra våre naboland. Kan det gi oss ideer for vår egen aktivitet?*

---

*MØTENE VÅRE foregår hovedsakelig på esperanto, for vi trenger å praktisere språket. Men vi prøver å ta hensyn til alle deltakernes behov. Vi mottar statsstøtte gjennom Studieforbundet Næring og Samfunn, etter studieplanen "Esperanto konversasjon".*

# OKAZIS

## **Pri nia demokratio** (16.7)

Ni interparolis pri la lastsemajna baloto, precipe pri la pluraj alaj partioj kaj ties devenoj. Ĉu estu unu partio, kelkaj aŭ multaj? La nun trie plej granda partio en Oslo estis antaŭ dek jaroj sub unu procento. Ĉu la ekapero de la voj-impоста partio atestas pri vivanta demokratio aŭ ĉu ĝi estas simptomo de iu ties malsano? Sed malgraŭ ĉio ni povas kontenti pri la nialanda sistemo kompare kun tiuj de certaj anglalingvaj landoj.

## **Baltaj E-tagoj en Litovio** (1.10)

Algis Kaspiravičius raportis pri la Baltiaj E-Tagoj (BET) en Panevėžys, Litovio. Aliĝis ĉi-jare rekorde multaj homoj el rekorde multaj landoj, iuj kredeble ĉar ili survojis al la UK en Finnlando, tamen eble aliaj venis al tiu bonkvalita internacia aranĝo anstataŭ al la UK. Oni rikoltis salutojn de multaj litovaj instancoj, ĉar Esperanto estas relative konata en Litovio, la "bo-lando" de Zamenhof.

## **Disinformado pri E-o** (21.10)

Gravaj konstatoj kaj demandoj: UEA prefere informu al la landaj asocioj pri gravaj okazintaĵoj por Esperanto kaj pri la utilo lerni Esperanton.

Ni komplete neglektas informi rete, televide, gazete ktp

Grandaj artikoloj en *Aftenposten* kaj *Morgenbladet* lastjare sur pluraj tutaj paĝoj. Sed \_neniu\_ reago!

Ĉu legantoj (subkonscie?) suspektas ke tia granda artikolo estas iel pagita propagando, kaj pli fidas etajn noticojn?.

Kiel mezuri la efikon de informago?

Aliflanke: Kiom mirinde multe povis fari solaj Heidi Goes en Indonezio kaj la tiam 15-jara Albert Stalin Garrido en Filipinoj!!

La reta *Esperanto-nytt* informas sobre pri po unu afero, sed ĝi atingas nur sepdekon da homoj kaj ni ne scias kiel ili reagas.

En la 80aj jaroj NEL havis (unupersonan) Informan Fakon. En 1994 NEL reformis sian strukturon, starigante tri laborgrupojn: por surmerkato (do informado), instruado kaj stimulo al la membroj. Post du jaroj oni konstatis ke tio ne funkcias, kaj malfondis la laborgrupojn – sed forgesis refondi la Informan Fakon.

## **Kajero pri malnovaj metioj fintradukita** (5.11)

Ni tradukis la lastan ĉapitron de la kajero pri malnovaj metioj. Kjell Peder afišos la tuton en Vikipedio, kun ligilo en la TTT-paĝo de Skedsmo Muzeo, kiu eldonis ĝin.

### **Manko de oficialaj vortoj (18.11)**

Kio estas *elektrisk sparkesykkel* en Esperanto? Manko de oficiala vorto eĉ por ordinara *spark* ŝajnas indiki ke tiaj veturiloj ne troviĝis en la medio ĉirkaŭ Zamenhof. Nur poste aperis skut(il)o. Ni serĉis en la vortaroj por provi esperantigi novajn fenomenojn. Eĉ por *regn-byge* mankas oficiala vorto – ĉu ĉar Zamenhof loĝis longe for de Atlantiko? Sed ni trovis ke ne-oficiala skualo estas "subita vent-puŝego, ofte kun ekpluvo".

### **Somera E-Studado, Slovakio (3.12)**

Aleksander Kvidbergskår partoprenis duan fojon la popularan Someran Esperanto-Studadon en Slovakio, ĉi-jare en Nitra. Oni ofertis lingvokursojn je pluraj niveloj, kaj ne nur pri Esperanto. Li raportis ankaŭ pri ampleksa kultura programo, kun prelegoj, ludoj, kantoj kaj pluraj ekskursoj,

### **Tago de la Libro (16.12)**

La ĉeestantoj prezentis librojn: Okaze de la hieraŭa Tago de la

Libro ni rigardis la frape malpezan (230 gm) *Bagatelaro* (de Rosbach) kaj la same frape pezan (1,4 kg) *Esperanto en Perspektivo* (de Lapenna, Lins kaj Carlevara). La unua, kiun ni havas mult-ekzemplere en la kelo, servas de jardekoj kiel *facila legaĵo*; la dua estas ampleksa kompendio pri la E-movado ĝis la jaro de la apero, 1974. Poste venis la epoko de interreto, kun tuja retroŝto, vikipedio, senpagaj retkursoj kaj estraraj kunsidoj per skajpo. Tamen tiuj ne povas plene anstataŭi fizikajn librojn – precipe por la maljuna generacio?

### **Pri kunveno en Lesjöfors (7.1.20)**

Ni aŭdis pri ĵusa kunveno de estraranoj de Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors, kiuj proponas kadron por sveda landa kongreso, eble en majo.

Ni ankaŭ diskutetis kiel reagi al propono de la kasisto de NEL pri divido de enspezoj de la ejo inter la ligo kaj la klubo.

---

## **Informbudoj en foiroj?**

**Se vi scias / aŭdos** pri konferenco aŭ foiro, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni**.

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

# Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 3. marto

## Tagordo / Dagsorden

1. Aprobo de la kunvoko
2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.
3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retroŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)
4. Jarkalkulo (same)
5. Eventualaj ricevitaj proponoj\*.
6. Elekto de estraro\*\*, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono, ĉiuj kun anstataŭanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono.
1. Godkjennelse av innkallingen.
2. Valg av møteleder og referent.
3. Årsrapport (sendes ut som e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den).
4. Årsregnskap (sendes på samme måten)
5. Eventuelle innkomne forslag\*.
6. Valg av styre\*\*, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité.

\* **Proponoj** atingu la estraron tri semajnojn antaŭ la jarkunveno *tre uker før årsmøtet*, do ĝis merkredo la 12a de februaro (semajno 7).

(Por proponoj de statutŝanĝoj la limdato estis la 10a de januaro.)

\*\*Mankas anstataŭanto por la revizoro.

---

## Ĉu iu volas lui kunvenĉambbron? – *leie møterom?*

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder.*

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94  
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 Ringen (ambaŭ direktoj) – aŭ 4 de Vestli – al Sinsen. Vd. pli ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) => "vojklarigo".  
\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/Forbundet 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper